Sabate mi havis du prelegojn: denove pri la Ĵaŭdo – Vegetara Tago de Gento (la iniciato estas multe sekvata en pluraj landoj) sed unue, kio ne jam eblis en la Azia Vegetarana Kongreso sed nun ja eblis, pri TEVA, kiel multjara membro de IVU (Internacia Vegetarana Unuiĝo). Mi tiel aranĝis ke mi finis antaŭ ol la horo pasis, kaj ne tuj estis demandoj, do mi demandis: „ĉu vi havas demandojn aŭ ĉu ni tuj lernu la alfabeton?". Oni respondis: „la alfabeton"... kaj do tion ni faris. Tio glate funkciis, kaj mi daŭrigis kun simplaj frazoj kaj la ciferoj. Venis la demando pri Esperanto-klubo en Jakarta. Mia respondo, ke tiu estos starigita jam en la morgaŭa vespero, aplaŭdigis la publikon. Ĉar tio ne rilatas vere al la kongreso, mi ne multon diros pri tio, krom ĉi tion: la klubo ricevis la belan nomon: „Esperiga Suno" kaj ekde novembro 2010 komencis novan, sesmonatan kursон. Niaj deĵorantinoj, Ilia kaj Acy, iĝis estraranoj.



Jennifer Bishop kaj Heidi Goes ĉe la budo de TEVA klariginte pri E-o. Ĉi tiuj entuziasmaj universitataj studentoj studas nutradon, sed tre interesiĝis pri ĉi tiu ne-pri-nutrada budo....

Post la semajnfino, lunde kaj marde, venis malpli da homoj al la kongreso. Sed la publiko ankaŭ havis alian konsiston, ĉar estis invititaj studentoj de la universitato Universitas Indonesia kaj de iu mezlernejo. Grupeto da ili restis sufiĉe longe ĉe nia budo kaj starigis multajn demandojn kaj eklernis kelkajn salutojn. En la lasta tago, mi sukcesis ricevi malplenan salonon dum tuta horo por doni enkondukan lecionon. Venis ĉ. 25 lernantoj, studentoj kaj plenkreskuloj, indoneziaj kaj eksterlandaj. Jennifer helpis gvidi la lecionon kaj Alan fotis nin.

Kvankam la kongreso estis ege brua (plurfoje mi devis peti mallaŭtigi la laŭtparolilojn), kaj mi sukcesis ĉeesti neniun prelegon krom la proprajn, mi konsideras ĝin sukcesa. Indis ĉeesti tie por varbi por Esperanto. La lokanoj povas daŭrigi lerni Esperanton en la klubo, kaj eksterlandanoj kiuj interesiĝis, ricevis informojn pri tio, kiel kontakti la landan asocion aŭ lokan delegiton.

Ke nia budo tiom sukcesis kaj daŭre havis deĵorantojn, eblis nur pro la helpo de Jennifer, Alan, Acy kaj Ilia. Mi volas ankaŭ ĉi tie elkore danki al ili pro tiu granda helpo. Dankon ankaŭ al Lode Van de Velde, flandra TEVA-ano, kiu pretigis la afiŝon por nia budo[1].

Esperantista Vegetarano

de Lilia FABRETTO (Italio)

En Esperantujo, Esperantisto estas tiu, kiu scias kaj uzas Esperanton. En vegetaranujo, vegetarano estas tiu, kiu neniam sin nutras per la estaĵoj el la animala regno.

De Esperantujo kaj de vegetaranujo, kiuj estas niaj idealaj, neŭtralaj patrujoj sen landlimoj, disbranĉiĝas pluraj branĉoj, t.e. fakaj asocioj.

[1] Vd la lastan kovrilpaĝon de la nuna numero – NdlR